45a Internacia Seminario, 27.12.2001 - 3.1.2002 en Rotenburg (Wümme)

2a informilo

Kiel atingi la ejon:

La ejo de la ĉijara IS estas granda kaj agrabla junulargastejo en la nordgermana urbo Rotenburg (Wümme). Antentu kiam vi planas vian vojon tra Germanio ĉar ekzistas pluraj urboj kun la nomo Rotenburg. Certiĝu ke vi iras al Rotenburg (**Wümme**) kiu situas proksime de la granda urbo Bremen en la nordo de Germanio.

Per aviadilo:

la plej proksimaj flughavenoj troviĝas en Bremen kaj Hamburg. De tie pluvojaĝu per trajno.

Per trajno:

De Bremen veturas trajnoj plurfoje tage, plie ekzistas kelkaj trajnoj kiuj veturas tra Hamburg. Utila retpaĝo por plani la vojaĝon per la trajno estas www.bahn.de.

Ek de la stacidomo bedaŭrinde nur veturas la linioj 725 kaj 743 je la tempoj 13:37, 16:03 kaj 17:15 (haltejo Berufsschule). Pro tiu malbona konekto inter la stacidomo kaj la junulargastejo kaj la (kun pakaĵoj verŝajne pli ol) duonhora piedvojo ni mendis buson por la 27a de decembro. Ĝi veturos inter la 18a kaj la 21a horo plurajn fojojn kaj kostos po 3 DEM (1,5 EUR) je persono.

Per aŭto:

De Bremen aŭ Hamburg iru laŭ la aŭtoŝosejo A 1 kaj eliru ĉe la elirejo Stuckenborstel aŭ Bockel kaj prenu la straton B 75 aŭ B 71 al Rotenburg. De Hannover iru laŭ la A 27 kaj eliru ĉe Verden-Nord kaj pluiru laŭ la strato B 215. Ene de Rotenburg sekvu la indikojn al "Jugendherberge".

Kion kunporti:

Memzorgantoj kunportu dormosakon kaj aermatracon aŭ similaĵon. Plenpagantoj povas kunporti proprajn litotolaĵojn (ne dormosakojn!) aŭ prunti tiajn de la junulargastejo pagante 7 DEM (3,5 EUR). Indas kunporti sportvestaĵojn, tablotenisajn rakedojn, kasedojn, KDjn, fotilojn, lumbildojn kaj videofilmojn pri ĉiaj Esperanto-aranĝoj, ludojn, naĝkostumojn kaj dancŝuojn. Se vi volas kontribui al la muzika vespero (sed ankaŭ se ne!), kunportu viajn muzikilojn kaj muziknotojn.

silvestra balo:

Por kune ĝui la jarŝanĝiĝon ni okazigos abundan bufedon kaj silvestran balon. Do kunporto vian plej bonajn vestaĵojn.

Kontribuu!

Ĉiaspecaj programeroj ankoraŭ bonvenas. Bonvolu sendi viajn kontribuproponojn kiel plej eble frue al la koncerna respondeculo (adresojn vidu sube). Ni precipe invitas ĉiujn aktorojn kaj muzikistojn kontribui. Por ajna programero haveblas rabato!

Volontuloj serĉataj!

La okazigo de la IS faciliĝas se ĉiuj ni iomete kunhelpas. La organiza teamo kore bonvenigas volontulojn kiuj povas fojfoje helpi en etaj sed gravaj taskoj. Bv. anonci vin ĉe unu el la organizantoj.

La Blinda Gardisto estas la oficiala murgazeto de la Internacia Seminario. Respondecas pri la enhavo de la dua informilo Felix Zesch kaj Till Schönberner.

Adresoj:

Aliĝilon al:

Norbert Piechotta, Rondellstr. 3, DE-85540 Haar, tel./fakso: +49 / 89 / 68 83 779, rete: is.admin@esperanto.de

Tema programo:

Christof Krick, Taubenweg 25, DE-33102 Paderborn, tel: +49 / 52 51 / 31 00 73, rete: is.tema@esperanto.de

Distra programo:

Brigitte van Raden, Valentinastr. 8, DE-54516 Wittlich, tel. +49/6571/21 92, rete: is.distra@esperanto.de

Vespera programo:

Sonja Terraschke, Pfefferstr. 10, DE-22143 Hamburg, tel.: +49 / 40 / 64 89 30 40, rete: is.vespera@esperanto.de

Asocia adreso:

Deutsche Esperanto-Jugend e.V., Grellstr. 36, DE-10409 Berlin, tel./fakso: +49 / 30 / 428 57 899, aŭ tel.: +49 / 177 / 28 34 320, rete: bero@esperanto.de, hejmpaĝo: www.internacia-seminario.de


stacidomo
al Bremen
kaj Hamburg
Rotenburg (Wümme)
proksime de Bremen
al Hannover
junulargastejo
kaj memzorgantejo
longega vojo
Gewerbegebiet
"West"
Ahe
Sport-
zentrum
In der Ahe
feld
Wümme
215
Heimathaus
Kreishaus
Amtsgericht
Verdener Str.